



ESPERANTO NORMANDA BULTENO

n° 167

unuiĝo de la normandaj esperantistoj
TRIMONATA BULTENO. BULLETIN TRIMESTRIEL.
de L'UNION des ESPERANTISTES de NORMANDIE.

FEBRUARO - 1990A - (PRINTEMPO 1990A - N° 82A NOVA SERIO)

NIA ĜENERALA ASEMBLEO

La Ĝenerala Asembleo de nia asocio okazos la 20an kaj 21an de Oktobro, en Hérouvill St Clair, apud Caen.

Kiel kutime raportoj pri nia aktiveco ankaŭ estos pretekso por renkontiĝi kaj interkonatiĝi en amika etoso. Jes ja ne mankas la temoj por por babiladi por fervoraj subtenantoj de translimaj interkomunadoj !!!

Kiel ordinara esperantisto, ĉion asembleon mi ŝatus partopreni ...



sintakso: vianon-sintakso

Sed tiujare la enhavo de tiu semajnfino estos aparte alloga kaj bonnivela ! Georges LAGRANGE, unu el la animantoj de la "Kvinpetalo" fama verkisto kaj tradukisto, prelegos verŝajne pri Edmont PRIVAT kaj LANTI, du grandaj figuroj de esperanto.

Dum la distra parto NIKOLIN', pli kaj pli famiganta kantistino, prezentos sian lastan repertuaron (legu ĉi-ene intervuon kiun ŝi donis al "Literatura Foiro"). G. Lagrange regalos nin per skeĉoj kaj monologoj. Talento al li ne mankas !!!

Por konkludi ni vizitos tre interesan muzeon pri la dua milito, kies koncepto pledas por paco, kaj solidareco inter la popoloj.

Ni tranoktos kaj manĝos en "Centre International de Séjour" tute komforta, por prezo malalta. Tiuj kvalitoj klarigas kial de nun ni devas rezervi la dormĉambrojn. **NEPRE SENDU VIAN ALIGILON AUTAŬ LA 1a DE APRILO !!!**. Poste estus tro malfrue por garantii la ĉambroluon.

Ni bone konscias ke ne facile vi povas antaŭvidi vian programon ĝis la venonta aŭtono, sed ni alfrontas "teknikajn" problemojn kiuj de ni tute ne dependas.

y.m.



NIKOLIN'

g. LAGRANGE

Nicole Pairoux, aŭ Nikolin', de kiam vi estas esperantistino ?
Fakte por mi vi estas novulino. Mi eĉ ne konis vin antaŭ du semajnoj.

Mi malkovris esperanton en '83a, do mi estas esperantistino de proksimume kvin jaroj.

Mi miras, ke vi tiel flue parolas la lingvon. Mi supozis ke vi praktikadas de multe pli longe. Kaj de kiom da tempo vi kantas en esperanto? Via "invito al ĝojo" estas rivelajo por multaj inter ni.

Mi komencis en '84a, kiam mi eldonis mian unuan E-diskon, "Haveno" en Belgio.

Gratulojn. Sed vi supozeble ne estis komencantino pri kantado.(...) Jes, fakte mi komencis kanti en la franca antaŭ dek jaroj.

Kaj krom tio, en la privata vivo, kio vi estas ?

Mi estas virino belgodevena, virino kiu ŝategas la vivon, kiu ŝatas ridi kaj kanti, renkonti la aliajn, kaj ĉefe la gesamideanojn. Kaj kiam mi malkovris esperanton, estis por mi granda ĝojo, ĉar mi ŝatas havi multajn amikajn renkontojn. Kaj mi elektis kanti ankaŭ esperantlingve, ĉar mi trovas tiun lingvon tiel bela, tiel poezia ; ĝi estas lingvo, kiu ebligas poeziajn nuancojn kaj ankaŭ tre bele sonas.

Tio estas interesa. Mi ankaŭ supozas, ke profesie vi havas kontaktojn kun infanoj.

Unue, t. e. antaŭe... mi estis instruistino. Mi do instruis infanojn kaj multe kantis, dancis kaj ankaŭ faris teatraĵojn kun ili. Kaj mi forlasis la instruadon por nur kanti, muziki kaj fari mem, t. e. memstare, sendepende, muzikativecon.

Ja ĝuste oni sentas tion, ke vi lernis multon antaŭ ol aktivi en la esperanto-mondo. Kaj esperinde via kariero ne finiĝos tuj : vi sendube havas planojn por la estonto, ĉu ?

Jes, jes. Mi opinias, ke oni prefere havu plurajn projektojn, por ke almenaŭ unu el ili oni povu realigi. Sed tuj, mi havas projekton kun la bendofako de LF-koop prepari novan kasedon kun lulkantoj, galimatioj kaj aliaj rimaĵoj, por infanoj inter nul kaj kvin jaroj.

Tre interesa ideo. Mi ja scias ke Giorgio Silfer zorgas pri tio nuntempe kaj mi opinias, ke via voĉo tute taŭgas por tiaj kanzonoj. Krom tio mi aŭdis, ke vi havas planojn por krei kulturan centron apud Namur... aŭ ion tian. Ĉu vi povas paroli pri tio ?

Ha ? Vi aŭdis pri tio ? (rido) Sed jam antaŭe kun Catherine Samain kaj germana samideano, ni komencis krei en Sud-Francio, apud Béziers, en la forlasita vilaĝo Cauduro (inter Saint-Chinian kaj Saint-Pons), antaŭ pli malpli du jaroj internacian ekologian centron, kies oficiala lingvo estas esperanto, kaj nun ni havas multe da laboro por fari tie. La asocio jam aĉetis terenojn kaj ruinojn, kiujn ni intencas rekonstrui.

Ni vidos iam... Ni ĉi-somere estos en Cauduro por kune labori. Kaj jen la dua projekto, kiun ni intencas realigi apud Namur -por la homoj kiuj iom konas Belgion : inter Dinant kaj Givet, apud la franca landlimo. Tie ni estas aĉetontaj, ni jam preskaŭ aĉetis grandan bienon, proksimume ses-hektaran, kun konstruaĵoj, herbejoj, arbaretoj, kaj rivereto tamen sufiĉe impona (l'Hermeton) kaj ni intencas tie proponi diversajn renkontojn kaj aktivecojn pri multnombraj fakoj kaj interalie esperanto, do proponi seminariojn pri esperanto, renkontiĝojn, festojn, ktp.

Gis baldaŭ, Nikolin' !

("literatura folio")

Se ni kontemplas la Monton de la Mirindaĵoj, plej okulfrapas ĝia fiera izoliĝo meze de sabla ebenaĵo. Ĉu temas pri maro ? pri vastaj marĉoj ? Ĉu vent-eroditaj dunoj, aŭ terpecoj ronĝitaj de la ĉien enŝoviĝanta maro, likva balanc-iĝado iren kaj reen ĝis la ventokaresataj altaj herbotigoj ? El ĉiuj francaj mar-bordaj pejzaĝoj la plej stranga nekonteesteble estas tiu golfeto proksimume 250 kvadrataj. kilometroj vasta. Tempe de la ekvinoksaj tajdoj en ĝia funelforma ekstremo observeblas ondegoj 15 metroj altaj. En la daŭro de nur kelkaj horoj tiu senlima ebenaĵo estas surkovrita de dubegriza akvotavolo. En la malfrua horo, kun egala rapideco la akvo retiriĝas 12 kilometrojn malproksimen de la marbordo kaj naskas malfacile distingeblan ŝlimejon.

En la komenco estis monteto : Tombelaine laŭnome. En tiu vorto troviĝas la ĝaŭla adjektivo "bele-os" kun la signifo : brilega. Tiun epit-eton oni uzis por titoli la lumdiaĵon de la kelta panteono. Ĉu en lia nomo "Lug" ni ne re-konas la hindoeŭropean radikon, kiu rilatiĝas kun ĉio luma, brila, blanka ?

s. boniol


Krome kutima tumulo. **mikaelmonto sub danĝero de la kelta teraltaĵo, la** En frua epoko de **(maro)** kristanismo oni anstataŭigis la nomon "Tombelaine" per "Tombo-Monto" -kio estas pleonasmo-kaj aljuĝis la nomon Tobelaine al nemalproksima insuleto. Pri tio oni ne tutcert-as, sed la hipotezo povas tamen esti akceptata.

Dum la oka jarcento Aubert, episkopo en Avranches, asertas, ke tri sinsekvajn noktojn li estis dumsonĝe vizitata de Sankta Mikaelo kaj insiste pet-ata konstrui preĝolokon sur Tombo-Monto. (Ni priatentu la reutiligon de antaŭaj religiaj elementoj kaj anstataŭigon de kulto per aliaj).

Obeema Aubert sin direktas al la monto kaj difinas la ĝustan lokon helpe de virbovo (ĵen reutiligo de la kulto de Mitrao, en kiu tre gravas la taŭro oferoj. Kelkaj eĉ riskis komparon de tiu taŭro-sango disversata super la ĉeest-antaro kun la sango de Kristo, kiu pere de la mesa ofero vigligas kaj sanktigas la fidelulojn).

La tieaj ermitoj -kiuj laŭ kelta kutimo kuniĝas nur por preĝi, sed ne

konstitigas ĥasikan monaĥejon- estas siavice petataj partopreni en la konstrulaboroj. La unua sanktejo, verŝajne sur la loko mem de defalinta menhiro, estas konsekrita en 709 aŭ en 709 kaj ĝi entenas relikvon el Italujo venigintan, ĝuste el sanktejo sur Monte-Gargano st aranta, jam fama pilgrimoloko honore al la ĉef-anĝelo. Sian modestan preĝejon Aubert nomas "Sankta-Mikaelo-sur Tombo".



La supredirita menhiro, montrilo kaj gardanto de la subteraj fortoj, ilin liberigis, kiam tera malaltiĝo ĝin faligis. Tial Mikaelmonto eble estas la ununura loko en la mondo, kie povas ekŝpruci la dia lumo, precize sur la interrenkonta punkto de la ĉefanĝelo kaj drako.


Se Mikaelmonto sub danĝero de la maro konsistigas unikaĵon, ĝi tamen ne estas la monto unusola, kiun la homoj dediĉis al la ĉefanĝela kulto. La altaĵoj estas la privilegiaj plej taŭgaj lokoj, por ke pleniĝu la misteraj interŝanĝoj teraj kaj ĉielaj. Ne temas pri kapturaj pintoj, sed preferi pri humilaj montetoj, eĉ teramasoj. Tia elekto simbolo evidentiĝas, ke sankta Mikaelo klopodas esti atingata de la homestaĵoj, por enverŝi en ilin la dian lumon. Duobla estas lia rolo : unuflanke al ĉiuj vivuloj li signas la superan lumon ; aliflanke tial, ke tomo estas tumulto, li alkondukas la animojn transen. Li estas la protektanto de la forpasintoj, la kunliganto de la dia inteligenteco kun la homa, la kunfandiganto de la fajroj ĉiela kaj tera. El tio fontas, ke ĉiu loko al dediĉita devas esti escepta, riĉa je tera magnetismo kaj ĉiela elradiado. Jen la konsisteroj de ia sankta geografio.

Perfekta ilustraĵo de loko tiaspeca videblas ĉe la tiel-nomata Monte-Gargano, apud Adriatiko. Tie mankas, nek grotoj, nek subteraj ejoj. Veran inican migradon konsistigas kaj la alirvojo, kaj la subtera paŝado. Tradicio raportas, ke tie ĉe sunsubiro la pordoj mem fermiĝis kaj same malfermiĝis ĉe sunleviĝo. Tiel la anĝelaro ĉiunokte en la templon desupris por celebri misteran Liturgion, kiun nur tre malmultaj homoj rajtis ĉeesti. Gargano-Monto orienten rigardanta povas esti konsiderata, kiel la unua fazo de konstrua tutaĵo, kies dua fazo ja estas Mikaelmonto okcidenten sin turnanta. Ambaŭ sanktejoj egalvaloras, samsignifas kaj pluigas unu la alian. (...)

Le Puy en Velay (Centra Montaro) estis la kruciĝo de pilgrimaj vojoj inter Nord-Eŭropo kaj Mediteraneo. Subtrajte de galla militisto aperas la ĉefanĝelo. La tiea vulkano konsistigas ĉeneron el tute grava vulkanovico. Necesis

ALIĞILO

Ne pre Resendu ĝin ANTAŬ LA 1a de APRILo



NOMO (Nomo) :
PERSONA NOMO (Prénom) :
ADRESO (Adreso) :

AKOMPANOS MIN : Indiku kion da personoj (indiquez le nbre de personnes vous accompagnant)

Mi deziras partopreni la Ĝeneralan Asembleon de U. N. E., laŭ la subaj kondiĉoj (je désire prendre part à l'Assemblée Générale de U. N. E, sous les conditions ci-dessous).
ĈAMBRO (chambre) Unulita (à 1 lit) Dulita (à 2 lits)

MI TRAKNOKTOS (nuit) *	PREZO (prix)	KIOM DA PERSONOJ	SUMO
VENDREDO VESPERE (Vendredi)	65,00	x	=
SABATO VESPERE (Samedi)	65,00	x	=
DIMANĈO VESPERE (Dimanche)	65,00	x	=

* Nokto + matenmanĝo (nuit + petit déjeuner)

MI MANĜOS (repas)	PREZO (prix)	KIOM DA PERSONOJ	SUMO
SABATO VESPERE Samedi soir	40,00	x	=
DIMANĈO VESPERE Midi	40,00	x	=

MI VIZITOS LA MUZEON Muŝée	35,00	x	=
----------------------------	-------	---	---

ALIĜKOTIZO (cotisation)	80,00	x	=
por studento étudiant	50,00	x	=
por senlaboruloj chômeur	50,00	x	=
SUMO			

MI PAGAS LA TUTAN SUMON AL "ASSOCIATION
(je verse la somme totale à) : HEROUVILLE ESPERANTO"
LA ĈEKON MI SENDAS (je retourne le chèque et ce
bulletin) al : NICOLAS YVES
17 37 quartier du Bois
14 200 HEROUVILLE ST CLAIR
SUBSKRIBO :
signature

ENTUTE/Total	
--------------	--

do, ke ĉe la pinto gardostaru iaspeca pordisto kapabla bridi la minacantajn subterajn fortojn. Tiun sanktejon oni povus analogie titoli "Sankta Mikaelo sub danĝero de la tero", danĝero foje pli timinda pro la insidema silentado. Ĉe unu flanko de la urbo, desur sia alta soklo Mikaelo kontrolas la subteran mondon -la mondon de la drako-, dum ĉe la alia flanko Maria leviĝas por lin subtenadi.

S. BONIOL

... Le Monde • Jeudi 15 février 1990

Les Verts votent pour l'espéranto

Lors de leur assemblée générale à Marseille, en novembre 1989, les Verts ont adopté une motion proposant l'utilisation de l'espéranto comme langue de travail dans leurs relations avec les autres partis politiques étrangers. Cette décision veut répondre aux « problèmes linguistiques qui, se posant aux Verts au sein du Parlement européen ainsi qu'au développement des mouvements écologistes dans le monde ». Elle concrétise également un travail de collaboration entre les Verts et les associations utilisant l'espéranto, comme l'Association internationale de M. Emile M. et l'Association de l'espéranto (IAVEU), de M. Mermel (1).

Antoine Waechter, secrétaire général des Verts, a pris officiellement position, lors de la campagne pour les dernières élections européennes de 1989, en faveur de la langue internationale, en répondant à un questionnaire envoyé par l'UEF (2), aux six dirigeants des partis politiques français. Le premier ministre français des Verts se prononce pour l'espéranto, à l'automne 1990 et l'espéranto sera l'une des langues de travail.

L'espéranto, fondé en 1887 par un médecin polonais, Louis Lazare Zamenhof, connaît actuellement un regain d'intérêt lié à l'approche de 1993 et à l'évolution de la situation en Europe de l'Est. Personne ne conteste la primauté de l'anglais, mais les langues germaniques commencent à jouer un rôle croissant, d'une deuxième langue pour les Unions soviétiques et la Hongrie, l'anglais groupe d'une soixantaine de

et l'espéranto. Ce dernier sera également utilisé avec la française et l'anglais, lors des premières élections européennes, qui se tiendront du 24 au 29 avril à tous les niveaux. La question d'une langue de communication mondiale y sera exposée. Des mouvements humanitaires d'une vingtaine de pays seront présents.

BRIGITTE CAMUS-LAZARO

(1) « Espéranto » n° 138, rue Jean-Baptiste 11220 St-Hippolyte-Frédéric, Tél. : 57-46-47-38. XVIIIE Jean-Luc Mermel, 71140 St-Denis-de-Frédéric.

(2) Union française pour l'Espéranto, 4 bis, rue de la Cerise, 75004 Paris, Tél. : 47-78-68-86.

(el ĉirkuŭlato de Emile MAS de la 1a de Decembro 1989)

Post dialogo kun Sino Renée Triville (U. F. E.) kaj Sro Henriko Masson (SAT-Amikano), ni samopinias ke :

- ni devas daŭrigi la informadojn ĉe ĉiuj ekologistaj, "biologiaj" firoj, renkontoj, ktp, pro tio ke la ekologistoj ĝajnas nun unu el la medioj la plej malfermitaj al esperanto.

- ni devas EK DE NUN, serĉi altnivelajn samtempajn traduktistojn (kelkaj diras "biŝtraduktistoj"). Lai unu el la sekretarino de la Eŭropa Verdaĵoj venonta kongreso certe okazos en Vieno (Aŭstrio) komence de Aprilo. (...) Pro la alveno de multaj orient-landanoj, eble, la esperanta lingvo estos unu el la elektitaj lingvoj. Do, se ni ricevas de Vieno demandojn, ni DEVAS POVI RESPONDI "JES" !

LA KASISTO INFORMAS VIN:

Kotizoj ricevitaj de la kasisto inter la 16a de Oktobro kaj la 15a de Februaro:

_Por 1989 pagis:Gesinjoroj SAMSON,FERET,LOISEL,LEROY,ROUSSEAU

Por 1990 pagis :Gesinjoroj LEBRUN,QUILLAUD,FERET,MICHAUD ,BESSIERE,
CETAIRE,SERY J,SERY S,CARON,NARDIN,TARMEL,PELTIER,HUET,
LARCHEVEQUE,GIBAUUX,NOEL,NICOLAS,LOISEL,LEROY,CHARRON,DUFLO,
HAULARD,LEGRET,LEMAZURIER,LENORMAND,TAILPIED,LEMARCHAND,
LAAGE,BLAISE,LANGUET,MARTIN,MAURICE,QUILLET,ROCQUES

Dankon al ĉiuj pagintoj.La aliaj ne forgesu ke ni bezonas ilian partoprenon por daŭrigi nian agadon.

ATENTU:Tiuĵ kiuj ne pagis kotizabonon de kelkaj jaroj trovos ĉi-kune admonilon.Se ni ricevas nek respondon nek pagon,ni ne plu sendos al ili la bultenon.

Kiel pagi? Faru ĉekon je ordo de:UNION des ESPERANTISTES de NORMANDIE
CCP ROUEN 283 40 H

Sendu vian Poŝtĉekon rekte al via CCP Centro

Sendu vian Bankĉekon al la kasisto 16 rue Lt Vaisseau Paris
76120 Le GRAND-QUEVILLY

NIA VIVO EN RUENA REGIONO:

Nur post renovigo de la estraro,ni povos reaktivigi la dormantan grupon. Ĉu estas volontuloj?Ni precipe bezonas Prezidant(in)on.

En Grand-Quevilly,daŭras perfektiga kurso kun deko da gelnantoj.

Ni eksciis naskiĝon de nova grupo en grand-COURONNE.Nideziras al ĝi grandan sukceson.Informojn pri tiu novnaskita grupo ni donos en venonta bulteno.



YVETOT YVETOT YVETOT YVETOT YVETOT YVETOT

KURSOJ : Post la someraj ferioj komenciĝis nova duagrada kurso kun 3 lernantoj. Bedaŭrinde, ne ekzistas nuntempe kurso por komencantoj.

ĜENERALA KUNVENO : Ĝi okazis en la Junuldomo la 27an de Novembro. Neniu ŝanĝo okazis en la estraro, kaj la grupo decidis presigi tradukon de la urba turisma prospekto por sendi al la tuta mondo.

notu kaj venu

TAGMANĜO KAJ DANCPOSTTAGMEZO : La grupo organizos la 11an de Marto 1990, je la 12a horo en "Salle du Vieux Moulin", rue de l'Etang, komunan tagmanĝon, kiun sekvos dancposttagmezo. Tiu aranĝo adresiĝas ne nur al esperantistoj, sed ankaŭ al la ĝenerala publiko. Kompreneble, ĉiuj el vi estos bonvenaj.

Prezo : 100 frankoj, sendotaj kun via nomo al nia prezidanto, S-ro P. POTTIER 21, allée des Roitelets Quartier Réfigny 76 190 YVETOT. Tel. 35 95 14 69.

Preferinde antaŭ la fino de Februaro per ĉeko al "Centre Culturel Esperanto d'Yvetot". Poŝtĉekkonto 1284-35 G.



HEROUVILLE HEROUVILLE HEROUVILL

Regule okazas la kursoj kiujn ĉeestas deko da personoj. Alvenis tri novaj personoj, unu nova lernantino, kaj du aliaj de Tours kaj de Caen.



Patrick Etienne revenis de vojaĝo dumonata en Ĉinio. En tiu lando li regule uzis la internacian lingvon. En lernejo oni lin intervjuis pere de esperanto. Tre certe lia baldaŭa prelego interesos niajn lernantojn.

Sylva, ankaŭ membro de la grupo de Caen, havis bonan sperton pri la uzado de esperanto dum sia vojaĝo al Kebekio kie familio esperantista ŝin gastigis. Ŝi al ni prezentos lumbildojn. Rumana samideano respondis al nia letero kaj priskribis la situacion de la movado en tiu suferinta lando. Kontakto ilin, ili bezonas materialon por reaktivigi la verdan stelon.



(modernaj dancoj...)

"ESPERANTO - NORMANDA BULTENO"
de l'Union des Esperantistes de Normandie.

Minimuma kotizo por 1990 : 45 frankoj. C.C.P. 283-40 H ROUEN
Sendu vian poŝtĉekon rekte al via CCP Centro.
banĉekon al : Pierre Quillaud
16, rue Lt Vaisseau Paris 76 120 Le Grand-Quevilly

Redaktas : Yves Nicolas 17-37 Quartier du Bois
14 200 Hérouville St Clair. Tel 31 95 11 81




8

EN HEROUVILLE (14)

ĜENERALA ASEMBLEO

EN LA 20a - 21a DE OKTOBRO



PROGRAMO PROGRAMO PROGRAMO PROGRAMO PROGRAMO PROGRAMO PROGRAMO PROGRAMO PROGRAMO PROGRAMO

SABATE

- 13 H 30 : Akcepto de la partoprenantoj
- 15 H 30 : Ĝenerala Asembleo de U. N. E.
- 19 H 00 : Vespermanĝo
- 20 H 30 : NIKOLIN' kantas, G. LAGRANGE prezentas skeĉojn

DIMANĈE

- 10 H 00 : Prelego de Georges LAGRANGE
- 12 H 00 : Tagmanĝo
- 13 H 30 : Vizito al muzeo por Paco

♦♦♦♦